

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Maj 1938

26 årg. Nr 5

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SEF ARBOGA PINGSTEN 1 9 3 8

I år om någonsin är det av vikt, att så många esperantister som möjligt samlas till årsmötet. Vi måste komma samman för att gemensamt planlägga vårt arbete. Det räcker inte med den kontakt, som förbundsstyrelsen har med landets esperantister genom Esperanto-tidningen och genom cirkulär. Vi måste personligen träffas och komma överens om hur arbetet angående propagandan och kursverksamheten skall ordnas.

Det är nämligen så, att esperantolivet i många klubbar numera är mycket obetydligt. Det är den personliga kontakten, som fattas, och denna kontakt kan åstadkommas just på årsmötet.

Låt oss alltså samlas så mangrant som möjligt till Arboga-mötet!

M Ö T E S P R O G R A M:

Anmälan om deltagande i årsmötet bör göras snarast möjligt, senast 25 maj, för att underlätta arrangörernas arbete. Beställning av logi och likvid därför göres samtidigt. Adress: Arboga Esperanto-klubb, Arboga. (Postgiro 142417.)

Mötesbyrån är under pingstaftonen förlagd till Arboga Stadskällare och öppnas kl. 3 e.m. Pingstdagen och Annandag pingst öppnas mötesbyrån kl. 8 f.m. och är då förlagd till Arboga rådhus.

PINGSTAFTONEN 4 juni:

(Lokal: Arboga stadskällare.)

- Kl. 17 Svenska Lärares Esperantoförbunds årsmöte.
- „ 18 SEF:s styrelse sammanträder.
- „ 19,30 SEF:s årsmöte öppnas. Aftonens program:
 - a) Tal av SEF:s ordförande.
 - b) Val av årsmötets funktionärer.
 - c) Föreningsombuden framföra hälsningar.
 - d) Gemensam supé. (Supén kostar kr. 3.25 inkl. kaffe och dricks.)
 - e) Underhållningsprogram.
 - f) Dans.

PINGSTDAGEN 5 juni:

(Lokal: Arboga rådhus.)

- Kl. 10 SEF:s årsmöte fortsättes. Därvid behandlas bl. a. Förbundsstyrelsens årsberättelse (som tillställts klubbarna i förväg), revisorernas berättelse, frågor rörande föreläsningssamheten, distriktsbildningen, propagandaverksamheten, klubbarnas arbetsuppgifter o.s.v.
- „ 13 Lunchrast.
- „ 15 Förhandlingarna fortsätts.
- „ 19 Tesupé på Vinbäckens hälsobrunn. (Kostnad 1 kr. inkl. dricks.)

ANNANDAG PINGST 6 juni:

(Lokal: Arboga rådhus.)

- Kl. 10 Förlagsföreningen Esperantos u. p. a. årsstämma.
- „ 11 Svenska Esperanto-Institutets diskussions-sammanträde. Frågor rörande undervisning och examina.

Esperanto-examina kunna avläggas under årsmötet. Anmälan härom skall göras i förväg till Svenska Esperanto-Institutets ordförande, adress Bergsvägen 23, Lidingö.

Esperantos världskongress i London.

Några tips.

Deltagareantal: Redan nu ha 1.300 personer anmält sig till kongressen. Minst ett par tusen komma alltså säkerligen att vara samlade, då kongressen öppnas i Londons universitet.

Kongressprogrammet: Detaljerna för högtids- och arbetssammanträden äro redan utarbetade liksom teateraftonen, då en trevlig komedi skall spelas. Dessutom bjudes på internationell bal och uppvisning av engelska och skotska folkdanser.

Praktiska arrangemang: Kongresskommittén har lagt sig vinn om att ordna allt på bästa sätt för esperantisterna. Esperanto kommer att i praktiken kunna användas i det stora varuhuset Selfridge. Vidare kommer den stora restaurangfirman Lyon att på samtliga matställen ha matsedlarna på esperanto, varjämte ett antal servitörer just nu gå i esperantokurs för att kunna betjäna oss. Dessa exempel visa, att engelsmännen verkligen gått in för att på värdigaste sätt ta emot esperantisterna.

Kongressresor: För svenskarna finnas tre olika resvägar att välja på: en över Göteborg direkt till London, en annan från Malmö över Danmark och en tredje från Trelleborg över Tyskland och Holland (för att undvika lång sjöresa!). Esperanta Turista Komisiono sänder prospekt över resorna till dem, som fundera på att delta.

ETK betonar vikten av att anmälan om deltagande i resorna sker med det allra snaraste, då nämligen de hittills reserverade platserna på båtarna i annat fall måste avbeställas.

Logi i London: De, som anmäla sig att delta i ETK:s resor, ha samtidigt sin logifråga ordnad i London. I priset för resan ingår nämligen även betalning för logi. I huvudsak ha i London för ETK:s räkning reserverats hotellrum med bäddar för endast en eller två personer.

Maten i London: Det är att märka, att ETK-s resenärer komma att gratis erhålla morgonmål på sitt hotell. Denna frukost består av smör, bröd, gröt, mjölk, skinka, ägg, marmelad och te eller kaffe. Det är alltså en rikligt tilltagen frukost, ja, så pass kraftig, att de flesta kongressdeltagarna säkerligen böra kunna hoppa över ett av de följande huvudmålen. Flera svenskar, som besökt London, försäkra, att det går mycket bra. I varje fall bör man komma ihåg att frukosten på "Lyon's" kostar 1:50 kr. och middagen 2:50 kr. Kaffe med bakelse och wienerbröd kostar 50 öre. Som synes behöver ingen vara ängslig för att maten blir alltför dyr i London!

Sommarens instruktionskurs.

Senaste anmälningsdag för deltagande i instruktionskursen är den 1 juni.

Enligt vad vi meddelat i föregående nummer av vår tidning förlägges kursen till Viggbyholm, i omedelbar närhet av Stockholm. Kurstiden är 4—16 juli. Kursen avser dels att förbereda till högre esperantoexamen och dels att utbilda till studie- och kursledare.

Den som är intresserad för kursarbete kan inte få ett lämpligare tillfälle till kombinerad instruktion och ferie.

Svenska Esperanto-Institutet,
Tegelbacken, Stockholm.

Kinakommittén tackar.

Kinahjälpen får härmed tacksamt meddela, att i Esperantista Klubo de Halmstad insamlats till Kinahjälpen Kr. 49:50, vilket torde redovisas i Eder tidning enligt önskan genom parketläggare J. M. Ahlström, Halmstad.

Å Rikskommitténs för Kinahjälpen vägnar

Professorkan Ingeborg Westman.

Nytt från Förlagsföreningen.

När det i augusti månad år 1930 plötsligt telegraferades ut över världen, att en norsk vetenskaplig expedition funnit resterna av Andrées nordpolsexpedition, väckte detta meddelande överallt det allra största uppseende. De dokument, som genom Andréefynden kommo till eftervärldens kännedom, hade skrivits i en situation utan jämförelse: övergivna i de ödsliga polarregionerna, med en säker död för ögonen, hade Andréemännen under kamp med köld och is nedtecknat sina upplevelser dag för dag.

Boken om Andréé och hans tappra följeslagare blev i ett slag en av den stora världsmarknadens mest sålda böcker. Esperantoupplagen PER BALONO AL LA POLUSO, utgiven av Förlagsföreningen Esperanto, utgjorde intet undantag. På jämförelsevis kort tid var hela upplagan slutsåld från förlaget. För en tid sedan har det lyckats oss att komma över en mindre restupplaga av detta värdefulla standardverk. Ingen esperantist bör försumma att skaffa sig Andréé-boken, detta dokument om mänsklig heroism och offervilja. Priset för häftade exemplar är kr. 9:—, och de inbundna exemplaren kosta kr. 11:50.

*

Ett annat standardverk, som sedan ganska lång tid tillbaka varit slutsålt från Förlagsföreningen, är d:r Zamenhofs ORIGINALA VERKARO. Av den återstående mycket begränsade upplagan ha vi just i dagarna fått in några exemplar. Originala Verkarö, som utgivits av professor Joh. Dietterle, innehåller en samling av d:r Zamenhofs originalarbeten, såsom tidningsartiklar, avhandlingar över speciella ämnen, tal, brev och poem. Detta värdefulla arbete visar d:r Zamenhof i hans utveckling, hans tankar, förslag och idéer om organisationen och språkets utveckling, hans omdömen om alla händelser i Esperantoland, hans förhoppningar och lidanden. Bokverkets papper och tryck äro förstklassiga. Pris inb. kr. 16:—.

*

Redan förra månaden påminde vi medlemmarna i EPOKO Libro-Klubo om att avgiften för andra sexmånadersperioden bör insändas med det snaraste. De som ännu ej inbetalat beloppet, kr. 3:75, torde göra detta per omgående. Vårt girokonto är nr 578, men glöm inte att å kupongen ange ändamålet med inbetalningen!

*

LITERATURA MONDO redigeras efter en delvis ny plan. Av tidningen utkomma årligen sex sextonsidiga nummer under samma namn som förut. Under namn av REVUO DE L' MONDO utgivas sex nummer med liknande sidantal och därtill kommer LINGVO LIBRO. Samtliga dessa tidningar erhålla prenumeranterna för ett gemensamt pris av kr. 7:40 pr år mot tidigare kr. 7:—. Prenumeration kan ske genom insändande av likvid till vårt girokonto nr 578.

När sommaren kommer...

Det har blivit allt vanligare, att semestertiden utnyttjas till resor inom och utom Sverige. Vad är då självklarare, än att esperantisterna ta tillfället i akt att utnyttja sin semesterresa i esperantos tecken!

På detta sätt ger ju resan dubbel behållning: dels nöjet av själva resan och dels praktiskt utnyttjande av esperanto.

Esperanto-turismen bjuder i sommar på en mängd möjligheter: E.T.K. ordnar nämligen resor till England, Estland, Finland, Jugoslavien, Polen och Tjeckoslovakien.

Begär prospekt hos

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO
Tegelbacken, Stockholm. Tel. 20 00 43.

Engelska och esperanto.

Det finns de som påstå och förmena, att engelska språket är en konkurrent till esperanto. Detta är en total missuppfattning. Inget nationalspråk är, har varit eller kommer att bli medtävlare till esperanto. Frågeställningen kan därför aldrig på allvar bli: engelska eller esperanto, men mycket väl: engelska och esperanto.

Studiet av engelska är ett både intressant och nyttigt ämne, som är varmt att rekommendera åt alla som ha tid och lust därtill. Först och främst därför att allt dylikt studerande är bildande. Liksom man kan utbilda sin kropp medelst gymnastik, så är den andliga gymnastik som studiet innebär ett bildningsmedel.

Men nu är det å andra sidan så, att studiet av ett främmande språk är en ganska vidlyftig historia och av engelskan i synnerhet, på grund av dess många grammatiska finesser, stora rikedom på färdigpräglade fraser och vidlyftiga ordförråd, vilket gör, att högst få personer, som inte ha engelska till modersmål, verkligen nå fram till att kunna det med mästerskap eller ens obehindrat. En vanlig människas kunskap i engelska förblir därför alltid ytterst bristfällig. Den räcker inte till att i en engelsk församling övertyga engelsmän. Ungefär lika föga effektivt är i allmänhet studiet av andra främmande språk. Av ett sådant kan man sällan uppnå annat än en fragmentarisk kunskap.

Annorlunda förhåller det sig med esperanto. När man inhämtat dess 16 grammatikregler och övat användningen av dess fåtaliga nyckelordförråd, är man så som i intet annat språk rustad att kunna uttrycka allt som med ett språk i vanliga fall uttryckes, varvid möjlighet finns att med omskrivningar få fram även fackorden. Och alla, som med en jämförelsevis ringa möda skaffat sig färdighet att behärska språket, stå likställda på samma plattform — ingen är barbar inför den andre.

Esperanto står alltså i en särklass. Inget annat språk kan ställas i motsatsförhållande till esperanto.

Det finns anledning att erinra om detta just nu, då Radiotjänst och t.o.m. ABF låter engelskan tränga ut esperanto.

Det är bara ett par tre år sedan rektor Hirdman inför ett esperantistiskt möte betygade, att just inom ABF esperantisterna utgjorde den pålitligaste kärntruppen vid studiearbetet. Något behov av denna kärna tycks emellertid för ögonblicket icke råda. Engelskan är nu alldeles särskilt på modet i dessa kretsar och föres fram med all möjlig reklam som "världsspråket". Och vi esperantister skuffas åt sidan. Kvaliteten frågar man inte längre efter, bara kvantiteten: *hur många* är ni?

Men — engelska har man pluggat i hundratals år och resultatet känna vi. Esperanto bidar sin tid. Den kommer!

P. Nn.

Internationellt läger för lärare.

I Litauen anordnas i juli detta år ett gymnastikläger för folkskollärare. Kursen, som varar i 18 dagar, är avsedd för Litauens lärare med syfte att ge praktisk kännedom om skolgymnastiken. För att göra kursen intressantare och samtidigt befördra internationellt samarbete inbjudes till lägret även utländska lärare. Deltagarna erhålla en mängd förmåner: 87,5 % rabatt på de litauiska järnvägarna, gratis logi och befrielse från kursavgift. För maten (4 måltider per dag) erlägges ungefär kr. 2:50 per dag. Kunskap i tyska eller esperanto önskvärd. Anmälningar till och förfrågningar om kursen ställs till Kleriga Ministerio, Kuno Kulturos Rumai, Kaunas, Litauen.

Radio och esperanto.

Enligt en upprättad statistik över antalet radioutsändningar på eller om esperanto i världen intill slutet av år 1937 ligger Sverige på femte platsen med 2.006 utsändningar. Första platsen belägges av Tyskland med 5.850 och andra av Frankrike med 3.551, Ryssland kommer på tredje och Österrike på fjärde plats.

En ung esperanto-lärlarinna.



I februari-numret år 1926 nämndes en svensk 3-årig tös, som kunde åtskilligt av esperanto. Hon dog (i juni 1936) i sitt 13-de år. Emellertid dyka upp här i landet flera 3-åringar, som gilla esperanto. Här presenteras en sådan. Hon heter Anna Greta Vidén, är född 24/2 1934 och har sina föräldrar i Stäket. Hon kunde vid 3 års ålder översätta från svenska till esperanto — svåraste riktningen — en mängd tingord; och nu vid 4 års ålder klarar hon utan att blinka ännu fler sådana. När som helst börjar hon med verben. Hon nöjer sig ej med att själv få kunskaper; hon ger av eget initiativ sina morbröder lektioner i språket ifråga, därvid givande dem förmaningen: "Lägg detta på minnet". — Hennes bild ses här; fotograferingen är gjord i juni 1937. V.

Inte för att saken i sig själv är så alldeles enastående — barn lära ju så lätt — men ungen är så rar, där hon kavat står framför sitt hem, att red. ej kunnat neka sig och läsaren nöjet se henne avkonterfejerad.

Två värdefulla standardverk:

Endast ett fåtal exemplar kvar!

Per balono al la poluso

De dokument, som genom Andrée-fynden kommo till eftervärldens kännedom, ha skrivits i en situation utan jämförelse: övergivna i de ödsliga polarregionerna, med en säker död för ögonen, ha Andrée-männen under kamp med köld och is nedtecknat sina upplevelser dag för dag.

Pris häft. 9:— kr., inb. 11:50.

Originala Verkaro de D-ro Zamenhof

Detta värdefulla arbete, utgivet av professor Joh. Dietterle, utgör för all framtid en källskrift av oskattbart värde. En fullständig och tillförlitlig samling av dr Zamenhofs originalarbeten, såsom företal till läroböcker, tidningsartiklar, avhandlingar över speciella ämnen, tal, brev och poem.

Papper och tryck förstklassiga. Pris inb. kr. 15:—.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Stockholm 1.

RADIO.

**Esperanto-Radio-Programo, majo 1938.
De la Internacia Radio-Servo.**

I. ĈIUSEMAJNAJ DISSENDOJ.

Dimanĉe:

9.10—9.20 Kortrijk 204 m. — Esp.-kroniko.
19.00—19.30 Reykjavik 1442 m. — Esp.-kurso.

Lunde:

18.20—18.30 Sottens 443 m. — Esp.-kurso.
18.45—19.00 Montpellier-Languedoc 224 m. — Kroniko.
20.00—21.00 J.V.2.R.L. Caracas, Venezuelo, 51,72 m. — Paroladoj, informoj.
21.30—22.00 PRE 2 Vera Cruz 1460 m. — Kurso, kantoj, informoj.
22.01—22.30 Roma II 245 m., 2.R.O. 31,13 m. Inf. k. prop.
22.45—23.30 Paris PTT 432 m. — *E.-teatraĵoj*. Detalojn vidu aliloke.

Marde:

18.00—18.10 Mor. Ostrava 269 m. — Parolado. Detalojn vidu aliloke.
21.20—21.35 Kaunas 1961 m. — Klaipeda 531 m. "Nia anguleto".
22.00—22.10 Tallinn 410 m. Tartu 587 m. Turi 410 m. — Inf. pri la estona vivo kaj la Esp.-movado.
22.25—22.40 PRF 3 Sao-Paulo 960 m. — Informoj pri Esperanto kaj parolado.
23.30—23.45 PRF 5 Rio-de-Janiero 31.59 m. — Oficialaj informoj kaj kantoj.
23.30—23.45 PRF 2 Rio-de-Janiero 780 m. — Relajso de PRF 5.

Merkrede:

2.45—3.45 X.E.C.R., Meksiko, 50.17 m. — Parolado, inf.
14.00—14.20 Paris PTT 432 m. — Elementa kurso.
21.00—21.30 LT I Rosario 384 m. — Kroniko.

Vendrede:

2.45—3.45 X.E.Z.R., Meksiko, 50.17 m. — Parolado, inf.
21.30—22.00 PRE 2 Vera Cruz 1460 m. — Kurso, inf.

Sabate:

10.30—???.?? 7 Ho Hobart, Tasmanujo, Esp.-kroniko.
13.45—14.00 Lille 247 m. — Esp.-kroniko kaj kurso.
16.15—16.30 Loxbergen-Limburg 202 m. — Inf., parolado.
19.01—19.18 Roma I 420 m., 2.R.O. 31.13 m. — Itala kroniko de l' turismo.
22.25—22.40 PRF 3 Sao-Paulo 960 m. — Informoj pri Esp. kaj parolado.
0.30—1.00 Radio-Barcelona 377 m., 42 m. — Parolado.

ALIAJ DISSENDOJ.

- 9.15—9.30 Marseille-Provence 400 m. Esp.-kroniko.
15.00—15.25 Wallonia 201 m. — Esp.-kroniko.
19.15—19.30 Athlone 531 m., Dublin 223 m., Cork 242 m. — Parolado.
- 20.13—20.20 Lyon PTT 463 m. — Esp.-kroniko.
- 22.35—23.35 Brno 325,4 m. Praha I 470,2 m. Bratislava 298,8 m. Košice 259,1 m. Ban. Bystrica 765 m. Mor. Ostrava 269,5 m. *Ĉeĥoslovakio invitas al la X-a tutsokola olimpiado en Praha*. Radio-filmo. Kompilis rondeto de Sokolfunkciuloj. Ludas anoj de TRAKT. Reĝio: D. Chalupa.
- 23.40—0.10 Hilversum I 1875 m. — Jaarsvald 415 m. J. Smeehuyzen S.C.J.: Mario-honorado.
- 10.55—11.10 E.S.T. Praha 31.41 m. (Disaŭdigo por Norda Ameriko.)
Amo en la Ĉeĥoslovaka popolkanto.
Ludas anoj de TRAKT. Reĝio: D. Chalupa.
- 17.10—17.30 Hilversum V.A.R.A. 301,5 m. — Kees Pruis, konata Nederlanda humoristo kantos en Esperanto kelkajn de siaj kantoj.
18.10—18.25 Hilversum I 1875 m., Jaarsvald 415 m. Esp.-kroniko.
- 15.00—15.25 Wallonia 201 m. — Esp.-kroniko.
21.30—21.50 Bulgaraj stacioj 20 m., 352 m., 235 m., 214 m. — Kroniko.

- 20.13—20.20 Lyon PTT 463 m. — Esp.-kroniko.
- 22.40—23.10 Hilversum I 1875 m., Jaarsvald 415 m. — J. L. Muller: La sekigo de la Suda Maro laŭ socia kaj ekonomia vidpunktoj.
- 17.10—17.30 Hilversum V.A.R.A. 301,5 m. — Elsendo de parolado en Esperanto okaze de la kongreso de la Internacio de Laboristaj Sport-Asocioj (S.A.S.I.) en Amsterdamo en kunlaboro kun la Nederlanda Laborista Sport-Asocio.
- 17.10—17.25 Hilversum I 1875 m. — Jaarsvald 415 m. Esp.-kroniko.
- 23.00—24.00 PRA 4 San-Salvador 740 m. — Inf. pri Esperanto kaj kantoj.
- 23.00—23.45 Radio-Paris 1648 m. — *La letero de rekomendo*. Unuakta komedio de Max Maurey. Traduko de s-ro Warnier. *Kuzeto*, unuakta komedio de M. Balucki. Traduko de s-ro Grenkamp. Presentado de s-ro Epsztein.

Paroladoj el Moravska Ostrava dum Majo.

Ĉiufoje horo 18.00—18.10.

- Jindrich Liborsky: Niaj samlandanoj skribas el eksterlando.
- D-ro Josef Skutil: Ni elfosas 2000-jaran malnovan fortikajon en Moravio.
- K. J. Erben: Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj. Tradukis D-ro Tomas Pumpr.
- Novaĵoj el la esperanta libro-foiro.
- La kontakto de la Ĉeĥoslovaka radio kun ĝia internacia esperantista aŭskultantaro.

Esperantoteatraĵoj el Paris PTT kaj Radio Paris dum majo.

Ĉiufoje horo 22.45—23.30.

- "Knock aŭ la triumfo de la Medicino". 3-a akto de J. Romains. Traduko de D-ro Corret. Presentado de s-ro Couteaux.
- "Johanino de Ark", radia memorigo de Glergeon. Presentado de s-ino Jeangirard.
- "Edziĝo kontraŭvola", unuakta komedio de Molière. Traduko de V. Defeutrel.
- "Mistera Krime", amuza unuakta komedio de Mikaelo Cases. Presentado de s-ro Arger.

Radioparolantoj kaj kursgvidantoj!

Bonvolu informi nin antaŭ la 15-a de majo pri la someraj disaŭdigoj.

Internacia Esperanto-Ligo.

La stato de nia ligo.

Ni konstante progresas. Jus decidis aliĝi al IEL la Svisa Landa Asocio; la Bulgara Asocio baldaŭ voĉdonigos sian membraron, kaj plej kredeble faros similan decidon. Jam pagis kiel individuaj membroj proksimume 400 pli ol je la sama dato en 1937. Ni rajtas havi bonan esperon pri nia sukceso en la nuna jaro.

La jarlibro.

Ĝi akurate aperis en la fino de marto kiel promesite. La nunjara jarlibro ampleksas 350 paĝojn, do proksimume 100 paĝojn pli ol la pasintjara. Entute ĝi ŝajnas al ni bona, sed pri la enhavo bonvolu legi apartan recenzon.

Mi havas provizon de la jarlibroj ĉe mi. Ensendu tuj vian kotizon kaj vi ricevos la jarlibron poŝtrevne.

La delegitoj en Svedujo!

Ni havas nun 90 delegitojn en Svedujo, sed en sufiĉe multaj gravaj lokoj mankas ankoraŭ tiaj. Ĉiu, kiu loĝas en loko, kie mankas delegito, kaj kiu emas fariĝi tia, bonvolu anonci sin al mi.

Karl Wästfelt,
ĉefdelegito.

SVEDA KRONIKO



Esperantoreklamo en Skillingaryd.

BORLÄNGE. Post la brila sukcesa esperantokurso en Borlänge, kiun partoprenis ĝis fino 55 entuziasmaj kaj kontentegaj gekursanoj, estis la 10.3 aranĝata bela kursfina festeno en la nova, moderna komunuma domo de Domnarvet. Krom esperantistoj kaj interesatoj el Borlänge-Domnarvet alvenis ankaŭ gesamideanoj el Insjön, Falun kaj Smedjebacken. Unue la ŝatata kursgvidanto redaktoro Morariu donis lastan lecionon kaj publikan lecionon. Poste okazis festena kunsido. Du gekursanoj en ĉarma dialogo diris sian opinion pri la interese ga kurso. Lernejestro K. A. Hallander, Borlänge, en kies lernejo okazis la kurso, en longa bonhumora parolado esprimis sian kontentecon pri la kurso. De la klubo parolis s-roj Vadfors kaj Risén. Por la gekursanoj en elokventa Esperanto parolis s-ro Erik Lindblad kaj transdonis poste la komunan donacon kaj florojn al s-ro Morariu, kiu dankis kaj promesis aŭtune reveni al Borlänge por gvidi daŭrigan kurson. S-ro Risén en la nomo de la klubo kore dankis al f-ino Bodén pro ŝia energia, senlaca prepara kaj propaganda laborado, kiu tiom signifis por la ebligo de la kurso, kaj transdonis al ŝi bukedon da floroj. — Dum la vespero kvardeko da novaj anoj anoncis sin al la klubo. — Post la kursfino la gekursanoj ekzercadas ĉiulunde en la klubo sub gvidado de f-ino Bodén kaj s-ro Risén.

La 11.4 la klubo havis sian jarkunvenon. Estis reelektata la malnova estraro, nome: A. Vadfors, prez.; E. Risén, vicprez.; f-ino S. Lundin, kas.; M. Jansson, sekr.; kroma estrarano f-ino T. Larsson. S-ro Risén bonvenigis ĉiujn geklubanojn al la distrikta kunveno, kiu okazos en Borlänge dum majo. *Mojo.*

EKSJÖ Esperanto Societo jarkunvenis 1.4. La estraro por 1938 estas la jena: Prez. C. Ekström; vicprez. kaj sekr. s-ro R. Carlson; kas. J. Lönn. *Ro. Ko.*

FARSBO Esperantoklubo 3.4. Publika parolado de s-ro T. Morariu pri Rumanio. Tradukis la klubo prezidanto Ivar Albertsson. 50 personoj ĉeestis. La klubo ankaŭ aranĝis belan esperantan ekspozicion. Post la prelego s-ro Morariu havis mallongan provlecionon por la publiko. *I. A.*

GEMLA. 2.4 prelegis Kola Ajayi antaŭ grandnombra publiko pri "Afriko, mia suna patrujo". La ABF-sekcio en Gemla, kiu aranĝis la prelegon, estas tre kontenta pri la rezultato. Inter la publiko, kiu tre ŝatis la prelegon, troviĝis kelkaj samideanoj el Växjö kaj Alvesta. *Ad.K.*

JÖNKÖPING. 29.3 kunvenis geistruistoj de popolaj lernejoj en Jönköping en -rd rod „Kallare spundn“ paroli daŭrigan studadon en Esperanto. Laŭ rekomendo de T. Morariu la kunvenintoj mendis dek ekz. "Verda Koro" de J. Baghy por uzado dum la regulaj monataj kunvenoj. — 1.4 la solenan kursfinon de T. Morariu ĉe la Kristana Popola Altlernejo ĉeestis 200 personoj, i.a.

gastoj el Eksjö kaj Ulricehamn. Rektoro R. Fur en sia dankparolado reinvitis s-ron Morariu por kursgvidado dum 1939.

LINKÖPING. La Internacia Stelo jarkunvenis 10.4. La estraro ricevis jenan aspekton: prez. Georg Larsson, vicprez. Märta Jannes; sekr. Dora Andersson; vicsekr. Hillevi Zackrisson; kas. Sven Gustavsson. Kiel reprezentanton de la klubo en ABF oni elektis Dora Andersson. Post la pritraktoj sekvis agrabla kunestado kun muziko, kanto kaj vivanta rebuso.

MALMÖ. 9.3 vizitis nin la rusa samideano s-ro Leonid Vasiljef kaj parolis pri: "Zamenhof kiel poeto". Belega parolado portita de la koraj varmo kaj simpatio, kiuj elradias el tiu entuziasma pioniro de nia lingvo. Intermite s-ro Vasiljef majstre deklamis kelkajn el la originalaj poemoj de nia majstro. Post la parolado okazis ordinara kunsido. — 12.3 la geaktoroj Allwin el Göteborg prezentis kelkajn scenojn el la dramoj de Strindberg. Per tiu prezentado la konataj geaktoroj donis al la ĉeestantoj ĝuindan tempeton. Aranĝis Laborista Esperantoklubo kaj Klubo Esperantista kune. — 24.3 interesa parolado de aŭstra samideano pri personaj travivaĵoj dum vojaĝoj en Eŭropo. Lumbildoj akompanis la rakonton. La membroj, kiuj tute plenigis la studhejmon, tre streĉe aŭskultis kaj dankis per tondra aplaŭdo. *G. H.*

MÖRBYLÅNGA. 24.4 vizitis "Ventinsulo-n" (Öland) s-ro H. Lewy el Germanujo. Lia parolado pri siaj aventuroj kaj vojaĝoj, plejofte piedire, tra multaj landoj en Eŭropo, dum kiuj Esperanto multfoje estis la sola kaj savanta helpilo, tre konvinkis la aŭskultantaron pri la utilo de nia lingvo. La kunveno por la esperantistoj en Mörbylånga kaj ĉirkaŭaĵo fariĝis, pro la vizito, agrabla interrompo en la ĉiutaga esperanta studlaboro; freŝa bloveto de la esperanta kontinento. *D. J.*

BORÅS. — La esperantoklubo Verda Rondo aranĝis 7.4 kostumbalon en la kunvenejo en "Örjans hus". Al la festeno, kiu samtempe estis finfesto por la partoprenintoj de la vintraj kursoj, oni ankaŭ invitis la laboristan



Finfesto kaj balo en Borås.

klubon. Unu el la lernantoj, s-ro Gunnar Axelsson, transdonis al la gvidantino f-ino Dagmar Persson memoraĵon de la lernantoj. Poste la vicprezidanto esprimis la dankon de la klubo. La multnombre vizitata festo tutvideble ĝojigis la novajn esperantistojn. *B.C-r.*

STOCKHOLM. 26.4 geaktoroj Allwin en la festsalono de ABF, sub la rubriko "Strindberg kaj la virinoj", prezentis scenojn el la dramoj La patro, Kreditoroj kaj Fraŭlino Julie. S-ro Allwin montris sin bona aktoro kun bonega scio pri sia arto kaj kompreno de la temo, kaj s-ino Allwin same bone prizorgis sian parton de la recitado. Se oni pripensas la relative mallongan tempon de ili uzitan por la studo de Esperanto, oni devas konstati ke ankaŭ el lingva vidpunkto ili kontentige sukcesis. La prezentado estis laŭdinda, kaj same laŭdinda estas la (el ekonomia vidpunkto certe riskplena) provo pere de Esperanto al la esperanta publiko prezenti nian plej ta-

Pri la listo de difinoj de vortelementoj.

Kiel respondo al artikolo de s-ro P. Nylén en la aprila numero, ni ricevis la jenan artikolon de la prez. de Esperantista Akademio, s-ro Isbrücker en Hago.

En la aprila numero de "Svenska Esperanto-Tidningen" mia honorinda kolego Akademiano Paul Nylén bonvolis ataki min en rilato kun la de mi iniciatitaj proponoj por difini la signifon de la Esperantaj vortelementoj. Li protestas kaj kulpigas min pri diktatoreco, pri provo ŝanĝi la lingvon Esperanto, pri dekretado k.t.p. Bedaŭrinde li faras tion en maniero, kiu farus proteston malfianke pli pravigebla ol lia estas. Oni povas havi malsamajn opiniojn — kaj efektive mi havas pri certaj aferoj alian opinion ol s-ro Nylén — sed tio ne estu motivo por tiaj malafablaĵoj kaj suspektigo. Jam estas sufiĉe da malpaco en nia movado, por ke almenaŭ sur pure lingva tereno oni restu objektiva kaj ĝentila.

Antaŭ ol veni al la diskutata temo mem mi devas korekti kelkajn evidentajn miskomprenojn de s-ro Nylén:

1. Mi skribis: "la Akademio entreprenas la starigon de listo de la difinoj de la vortelementoj de Esperanto." Efektive la Akademio entreprenas tiun laboron — kvankam mi iniciatis kaj proponis ĝin. Neniu decido estos farata sen la tute regula aprobo de la Akademio kaj de la Lingva Komitato. S-ro Nylén bovolu ne aserti, ke mi "entreprenas tiun ĉi liston sen interkonsiliĝo kaj sen aprobo de la Akademio". S-ro Nylén mem ĉeestis en la kunveno de la Akademio kaj de la Lingva Komitato en Varsovio, kie mi detale klarigis mian proponon, kiu renkontis ĝeneralan aprobon, ankaŭ de la flanko de s-ro Nylén. En n-ro 13 de la "Oficialaj Sciigoj de la Akademio", aperinta en Oktobro 1937, mi anoncis publike kaj al ĉiuj Akademianoj kaj L.K.-anoj, la entreprenotan laboron kaj neniu protestis, ankaŭ ne s-ro Nylén, dum aliflanke mi ricevis multajn esprimojn de kontenteco kaj aprobo pro mia iniciato.

2. Efektive mi kunmetis la liston "post interkonsiliĝo kun S-ro W. Bailey, Direktoro de la Sekcio por Komuna Vortaro". Mi ne rajtus diri "en interkonsento kun S-ro Bailey", ĉar vere evidentiĝis, ke S-ro Bailey havas pri la temo de la gramatika karaktero de la radikoj alian opinion ol mi. Sed la vorton "protesto" mi en lia letero ne trovis. Post klarigo de sia vidpunkto li skribis: "Vi sendube komprenas, ke mi pli volonte vidus vian liston sen la notoj (a), (s), (v tr) k.c." Ĉar en la plimulto de la okazoj mi povis sekvi la rekomendojn kaj ŝanĝproponojn de S-ro Bailey, mi opiniis, ke mi plej bone povas esprimi miajn rilatojn kun li kiel "interkonsiliĝo". Kaj se restos diferencoj de opinio, nur la Akademio kaj la Lingva Komitato decidus en tute regula kaj demokrata maniero. Nenio estas al mi tiel fremda kiel diktatoreco.

Kaj nun ni venu al la afero mem. Ĉu vere mi atencis kontraŭ la Zamenhofa lingvo aŭ la Zamenhofa sistemo? Efektive mi tute aprobas la teorion de de Saussure, sed nur, ĉar ĝi laŭ mi tute akordiĝas kun la intencoj de Zamenhof! Kaj ŝajnas al mi ne juste, kiel S-ro Nylén faras, miskreditigi la opinion de de Saussure per lia

lentan dramiston. Tamen ni volus konsili al la geaktoroj ke ili — kiuj laŭŝajne memstudadis Esperanton kaj tiurilate atingis vere admirindan rezultaton —, konsultu iun el niaj lingvopedagogoj por eta polurigo kaj per tio atingi ankoraŭ pli modelan elparolon. Se ordinare la sveda esperantisto posedus same bonan elparolon, kiel havas ekz. s-ro Allwin, li povus senti sin tute feliĉa, sed ni opinias la rolon de esperanta aktoro tiel grava el pedagogia vidpunkto, ke ni tute amike kuraĝis tiujn ĉi rimarketojn.

Al la esperantogrupoj ni senrezerve rekomendas la geaktorojn Allwin por klubaj programoj. *BEN.*

VETLANDA. 13.3. En nia klubo parolis s-ro Schneider tre interese pri siaj vojaĝoj tra Eŭropo kaj precipe pri siaj aventuroj en la hispana revolucio. — 28.3. Okazis finfesto de la komencanta studrondo. Samtempe okazis letervespero kun leteroj de plej diversaj landoj. S. B.

konduco. La praveco de lia opinio ja ne dependas de tio, ĉu li jes, aŭ ne forlasis Esperanton. Ankaŭ mi plene kondamnas lian agadon en tiu rilato.

Sed nun mi petas S-ron Nylén montri al mi la lokon en la Fundamento aŭ en alia verko de Zamenhof, kie li neĉe deklaras, ke la radikoj ne havas gramatikan karakteron. Kaj kontraŭe mi citas regulon 11 de la Fundamenta Gramatiko: "Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kuniĝo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj". Kaj en la Fundamenta Krestomatio sur paĝo 248 (sesa eldono) ni legas: "Mi aranĝis plenan dismembrigon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el sensanĝaj vortoj ... la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kuniĝo de sensanĝaj vortoj ... la vorto "fratino", kiu en efektiveco konsistas el tri vortoj: *frat* (frato), *in* (virino), *o* (kio estas, ekzistas) (= kio estas frato-virino = fratino) ..." Mi ne bezonas citi pluajn argumentojn, ĉar ili estas abunde troveblaj en la verkoj de de Saussure.

Kaj eĉ sen tiaj argumentoj oni povas diri, ke la gramatika karaktero de la vortoj (la radikoj estas vortoj!) troviĝas en la esenco de la homa lingvo mem. Se mi skribas, forlasante ĉiujn finaĵojn: "nigr' kat' trink' blank', lakt'", ĉu iu povas dubi pri la signifo de tiu frazo? Kaj mi invitas S-ron Nylén doni klaran difinon de la radikoj "aĉet'", el kiu ne evidentiĝas, ke li komprenas ĝin kiel transitivan verbon.

Ĉu vere la tuta afero estas tiel grava, kiel oni ŝajnigas ĝin kaj ĉu ĝi valoras la penadon, la paperon kaj la inkon, kiun oni malŝparas al ĝi? Kion ni fakte faras? En la Universala Vortaro Zamenhof donis la tradukojn de la radikoj (ne de vortoj kun finaĵoj, sed tamen de vortoj) per substantivoj, adjektivoj k.t.p. Per tio li difinis la gramatikan karakteron de ĉiu aparta radikoj, kiu cetero plej ofte sekvas senpere el la signifo mem, kiel montras la ĉi supra ekzemplo. Nur en kelkaj okazoj povis ekzisti iu dubo kaj tial estas utile, ke ni notu precize por ĉiu radikoj, en kiun klason Zamenhof metis ĝin aŭ en kiun ni devas meti la pli novajn radikojn, kiuj ne troviĝis en la Universala Vortaro. Kiam oni volas difini vorton (radikoj estas vortoj!) oni ja unue devas esti klara pri la vortspeco, pri kiu oni parolas. Nia laboro estas nenio alia ol konsciencia enregistraĵo de tio, kion Zamenhof enmetis en la lingvon kaj la riproĉon, ke ni deziras detrui la Zamenhofan sistemon aŭ dekreti (eĉ diktatore!) principojn, kiuj estas fremdaj al Esperanto, ni forjetas kun pura konscienco!

S-ro Nylén citas la ekzemplon: "Kristnasko". Se oni ne volas diri, ke eble "Kristnaskiĝo" estus pli konsekvenca formo, oni povas kompreni la vorton kiel mallongigon sufiĉe klaran de "Kristnaskiĝo", eĉ de "Kristnaskiĝtago" aŭ oni klarigu ĝin kiel: "tago de la nasko de Kristo" (kiam Maria naskis Kriston). La ekzemplo, kiun S-ro Nylén donas, eĉ klare montras, ke li mem estas konvinkita, ke "nask'" estas transitiva verbo. Se vere "nask'" estus neŭtrala, oni povus egale uzi la verbon "naski" por "naski" kaj por "naskiĝi".

Mi volonte respektas kaj honoras S-ron Nylén kiel la "solan el la 9 unuaj elektitaj Akademianoj ĉe la fondo de la Akademio antaŭ 30 jaroj", sed en lingvaj diskutoj ni bezonas taŭgajn argumentojn kaj tiujn eĉ titolo de nestoro ne donas. Dume mi volonte ricevos la opinion pri ĉi tiu afero de miaj aliaj kolegoj Akademianoj kaj Lingva-Komitatanoj.

Ir. J. R. G. Isbrücker,
Prezidanto de la Akademio
— ĉiam fidela al la
Fundamento de Zamenhof.

Hago, 16 Aprilo 1938.

loma respondo.

La Redaktoro de S.E.G. donis al mi okazon mallonge respondi, kiun mi danke uzas.

Eble mi faris per mia artikolo eraron en tio, ke mi ne envolvus mian kritikon kontraŭ la Listo de s-ro Isbrücker, en lia kvalito de Prezidanto de la Akademio, en ĝentilajn frazojn. Mi sendube iris tro rekte al la temo. Pro tio li koleras pri mi, kaj hontigas min. Nu, ĉiu de-

vas pagi pro siaj pekoj! — Mallonge respondi kaj samtempe klare argumenti estas malfacila afero, sed mi provos.

Unue pri miaj "miskomprenoj". 1:a. La Protokolo de la konferenco de la Lingva Komitato dum la Varsovia jubilea kongreso informas en § 5: "Kiel plej proksiman kaj necesan taskon de la Akademio s-ro Isbrücker proponas la eldonon de oficiala Universala Vortaro kun difinoj en Esperanta lingvo." — Tie mi absolute ne aŭdis parolon pri ia fikso de gramatika karaktero de la radikoj ("en Esperanta lingvo"!). Ne miru do, ke mi ne protestis!

Pri mia 2-a "miskompreno": Mi volus vidi tiun leganton kiu ne komprenis la esprimon "interkonsiliĝo" same kiel mi. Laŭ la uzo, kiun faris s-ro Isbrücker de tiu vorto, mi sendube povus diri (post Varsovio), ke "mi faris mian proteston post interkonsiliĝo kun s-ro Isbrücker"!

La teorioj de s-ro de Saussure estis interesa dokumento por sia tempo; tiuj teorioj kune kun la fikso de gramatika karaktero de radikoj lin forkondukis de Esperanto. Ĉu tiu, kiu kondukas for de Zamenhof, ne similas en alarma grado al falsa profeto? Al mi sufiĉas Zamenhof — sen "fiksaj" ideoj! La praktika konsekvenco de teorio ordinare montras ĝian valoron.

Lingvo internacia, universale taŭga, povas ekzisti nur per radikoj, ne per pretvortoj. Radiko, kiu estas transitiva verbo, ne estas radiko, sed pretvorto.

Nur per ekzemploj Zamenhof montris, ke la radikoj ne havas gramatikan karakteron. En Universala Vortaro (Varsovio 1894) ni legas jam sur la unua paĝo sub *ad'* " . . . *ex. paf'* coup de fusil — *paf'ad* fusillade; . . . z. B. *danc'* der Tanz — *danc'ad'* das Tanzen; (ruse:) *ir'* idti — *ir'ad* ĥodit." P.33: "*paf'* tirer, faire feu, schiessen"; p. 11: "*danc'* danser, tanzen". Unu saman radikon Zamenhof prezentas jen en substantiva signifo, jen en verba; la radiko *koler'* sub verba kaj adjektiva signifo. Por Zamenhof estas tute natura afero, ke la radiko (*paf'*, *danc'*, *ir'*, *koler'*) reprezentas nur la komunan signifon, sed gramatike ĝi estas neŭtrala: se ni alpensas *o*, ĝi estas substantiva vorto, se ni alpensas *i* al la radiko, ĝi fariĝas verbo. Li donas sur p. 34: "*parol'* parler, sprechen; *interparol'* entretien, Gespräch". Per tiuj ĉi ekzemploj li montras, ke por li la radiko estas samtempe ĉio; per aliaj vortoj: la radiko havas nenian gramatikan karakteron, sekve ĝi havas ĉiujn gramatikajn karakterojn: t. e. ĝi estas neŭtrala. La *finiĝo* faras el la radiko vorton, donas al ĝi gramatikan karakteron. Zamenhof montris, ke "la radiko parol estas nek paroli nek parolo nek parola, nek kiu ajn el la vortoj de la familio, ĝi estas la simbolo de la komuna ideo trovebla en la tuta familio, la signo karakteriza de la familio", kiel klarigas Doktoro Panel, tiel majstre kritikante la teoriojn de s-ro de Saussure, kiuj ŝajnas esti por s-ro Isbrücker sakramento. La naciaj lingvoj ne havas alian rimedon por traduki la Esperantajn radikojn ol per naciaj vortoj; ili ja ne posedas respondajn radikojn.

En regulo 11 de Fundamenta Gramatiko Zamenhof uzas la esprimon "vorto" en la senco de *sememo*, t. e. signifportanto, do kion ni nomas nun radiko. Li diras ja mem, ke "la diversaj gramatikaj formoj . . . estas esprimataj per la kuniĝo . . ." Per tio ĉi li ja klarigis, ke antaŭ la kuniĝo ne ekzistis la gramatikaj formoj; tiu kuniĝo faras substantivojn, verbojn kaj la alian gramatikon.

La frazo pri la "kat' nigr'" pruvas ke ion montras kuintima vortordo kaj ordinara uzo de radikoj, sed la solvo de la problemo ne "blankas en tiu trinka lakto".

La signifo de *aĉeti* estas en la naciaj lingvoj verbo transitiva; tio ĉi ne aliigas la strukturon de Esperanto. Ĉar la konstruo de Esperanto "estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj"; tamen la lernanto eĉ ne supozas ke la konstruo diferencas de lia patra lingvo, diras Zamenhof. La Akademio devas tamen ne nur supozi sed konscii tiun diferencon.

La Redaktoro de tiu ĉi gazeto ne ŝatas tiajn diskutojn teoriajn. Pro tio mi ne povas funde argumenti la problemon, kies baza ŝtono estas la neŭtraleco de la radikoj, nur aludi. Tiu problemo povas ŝajni al la Prezidanto de la Akademio negrava aŭ ne. Ĝi tamen tuŝas la principojn de Esperanto, pri kies konservado la Akademio devas zorgi. — Se li atentus mian proponon raportitan en § 6 de la komence menciita protokolo, pri efektiva inter-

La printempo kaj ni.

Venis al ni la plej bela sezono de la jaro — la printempo, vorto kiun oni uzas eĉ por esprimi la aĝon de junaj fraŭlinoj. La homo estu kiel ajn pesimisma kaj kolerema, sed dum la printempo ĝi devas almenaŭ iun fojon senti sin felika en la koro. La printempo estas tempo de renaskiĝo, kaj ĝi ĉiam forte impresas al la homo, ĉar tiu estas estaĵo destinita al renaskiĝo. Ĉie en la naturo vidiĝas nova vivo. La arboj suĉas sukcon el la tero, kaj la alaŭdo trilas sian belan kanton en la aero, himnon al la vivo, al ĝia kreinto. Al ordinara homo ne eblas vorte priskribi ĉion, kion oni sentas dum la printempo. La lingvo baraktas en lia cerbo, kaj sub lia kraĵono la vortoj fariĝas krudaj eroj, el kiuj li ne povas kunmeti tiun belan bildon, kiun vidas lia animo. Nur la poeto, la vera artisto, povas esprimi tion, kion rakontas laodoro de la siringo kaj kion flustras la velura vento.


Sed alie estas por ni esperantistoj. Kompreneble ankaŭ ni plene ĝuas la printempon, sed per bilda parolo ĝi estas por ni tempo de endormiĝo. La esperantisto en ni subite montras grandan dormemon. Ĉe la printempo finiĝas ĝenerale la kursoj, la belegaj vesperoj logas per eksterdoma amuzo, kaj kelkaj el ni eble havas ĝardenon, kiu postulas grandan laboron. Jen troviĝas multaj kaŭzoj, kiuj provas endormigi nian esperantoanimon. Sed kontraŭ tiuj ni devas esti tre atentaj. Se ni dum la vintro lernas al ni certan kvanton da vortoj, ĉu en kurso, ĉu per memstudado, vi devas dum la somero uzi tiun vortprovizon kaj tre atente gardi ĝin kontraŭ pereco. Se ni ne faras tion, ni similas al homo, kiu ekzemple ricevas donace grandan domon kaj lasas ĝin malplena, ne utiligante ĝin al si. Tial ni devas bone flegi la esperantan planton, por ke ĝi kresku ĝis plena grandeco. Se oni dum certa tempo lernas ion al si kaj dum iu intertempa periodo ne uzas ĝin, ĝi falas el la kapo, kaj oni scias same malmulte kiel antaŭe. Tiamaniere oni ne fariĝas esperantisto. Ne, oni devas persisti en la lernado, ĝis kiam oni atingas la celon. La nepoj vin benos, se vi pacience eltenos, diris en unu sia poemo Zamenhof. Povas esti, ke vi neniam havos nepojn, sed tamen vi akiros al vi bonan profiton, se vi bone ellernos Esperanton, kaj vi grave helpas la efektivigon de la bela revo de Zamenhof, la plej bela revo, kiun povas elpensi homa cerbo: interfratigo de la popoloj kaj eterna paco sur la tero.

S h a n g r i-L a.

komunikigado kun la akademianoj, tiu ĉi polemiko sendube fariĝus superflua. "*In dubiis non est agendum*". La Akademio tute ne povos esti tribunon por iu membro por propagandi siajn privatajn opiniojn pri la lingvaj problemoj. Tio, kion proklamas la Akademio nepre devas esti por ĉiuj samideanoj nedubindaj veroj, aksiomoj.

Fine, estas al mi kara devo diri kaj substreki, ke la personon de s-ro Isbrücker mi respektigas kaj estimas, kaj ĉiam rigardas kiel admirindan amikon.

Paul Nylén.



La Internacia Altlernejo en Helsingør.

Internacia kurssemajno 16—24 de julio:

1. Elementa Cseh-metoda kurso.
2. Daŭriga kurso.
3. Perfektiga kurso.
4. Seminaria kurso.
5. Esperantista feriado.

10-taga internacia ferio esperantista 15—25 de aŭgusto:
Dum tiu tempo okazos ankaŭ **Seminaria kurso.**

En La Internacia Altlernejo en Helsingør okazos de-
nove en somero 1938 Internaciaj Feriaj Esperanto-Kur-
soj kaj Internacia Ferio Esperantista. En la pasinta
somero partoprenis 210 personoj el 14 landoj.

Helsingør (Elsinoro) estas loko tre konata el la dra-
mo de "Hamleto". Ĝi havas 16.000 loĝantojn kaj situas
iom norde de Kopenhago (unu horon per trajno de Ko-
penhago kaj 20 minutojn per ŝipo de Helsingborg) tuj
apud la maro kun eksterordinare bela banstrando, kie
oni havas favoran okazon por ĝui sanigan kaj freŝigan
banadon. Ĉirkaŭ Helsingør estas multaj vastaj kaj ĉar-
maj fagarbaroj, kiuj alloge invitas ĉiujn por fari ravajn
promenojn. La Internacia Altlernejo estas ĉirkaŭata de
granda malnova parko, en kiu la kursanoj povos pro-
meni post kaj inter la lecionoj.

16—24 de julio 1938 okazos jenaj kursoj:

1. **Elementa Cseh-metoda kurso.** Ĝi estos nur por ko-
mencantoj kaj por samideanoj, kiuj deziras profunde
studi la Cseh-metodon.
2. **Daŭriga kurso.** Laŭ konversacia metodo. Ĝi estos
por tiuj, kiuj jam lernis Esperanton per elementa

Marie Koenen:

LA SUNKRONO

El la nederlanda lingvo tradukis
P. Ch. M. van de Vijver.

La verkoj de Marie Koenen, precipe ŝiaj
historiaj, eminentas pro stila forto, lingva
simpleco, poeta sento.

Prezo 2 kr.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Stockholm 1.

Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj

en Helsingør, Danlando, Somero 1938.



Partoprenantoj de la feria semajno somero 1937.

kurso, ĉu Cseh-metoda, ĉu alia, sed kiuj ankoraŭ ne
havis tempon aŭ okazon por partopreni daŭrigan
kurson post sia komenca kurso.

3. **Perfektiga kurso.** Ĝi estos por tiuj, kiuj jam lernis
iom pli de nia lingvo, sed kiuj deziras perfektigi kaj
akiri parolekzercon. Jenaj fakoj estos pritraktataj:
Esp-literaturo, Esp-historio, gramatikaj problemoj
kaj konversacio. Kiel eble plej facilaj vortoj estos
aplikataj de la geinstruantoj kaj prelegantoj.
4. **Seminaria kurso, t. e. prepara kurso por Esp.-gein-
struistoj.** Ĉefe estos pritraktata la instruado laŭ
Cseh-metodo, sed krom ĝi estos pritraktataj ankaŭ
instruado laŭ aliaj metodoj, gvidado de infankursoj
kaj gvidado de daŭrigaj kaj perfektigaj kursoj. Ĉiu
partoprenanto rajtos fari provlecionon kaj ricevi
ateston de TAGE (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj
Esperantistaj) pri partopreno en ĉi tiu kurso. La
ĉefa gvidantino de ĉi tiu kurso estos f-ino Margr.
Saxl. Okazos ankaŭ prelegoj pri Esp.literaturo, his-
torio kaj gramatikaj problemoj.
5. Al tiu semajno estos kore bonvenaj ankaŭ esperant-
istaj gastoj, kiuj deziras pasigi sian ferion inter sam-
ideanoj el multaj landoj.

15—25 de aŭgusto 1938 okazos jenaj aranĝoj:

1. **10-taga internacia ferio esperantista.** En tiu aranĝo
povos partopreni ĉiuj ajn gesamideanoj el la tuta

mondo, kiuj deziras pasigi sian ferion en eksterordinare bela regiono inter multaj diversnaciaj gesamideanoj. La ĉefa afero de ĉi tiu feria tempo estas la kunestado. Unu aŭ du prelegoj pri internaciaj kaj kulturaj temoj okazos ĉiutage, kiujn oni laŭplaĉe povos ĉeesti.

2. **Seminaria kurso.** Pro diversaj instigoj tiu kurso estos ripetata dum ĉi tiu tempo. Ĉefa gvidantino F-ino M. Saxl. Pri detaloj vidu sub 4 de la julia kursarango.

Prelegantoj kaj geinstruistoj de la aranĝoj en Helsingör: F-ino M. Saxl, Berlin, mondkonata Cseh-instruistino, gvidos ambaŭ seminariajn kursojn kaj la daŭrigan kurson, prelegos en la perfektiga kurso kaj dum la 10-taga internacia ferio esperantista. — S-ro de Ward, Rotterdam, konata Esp-literaturisto kaj verkisto prelegos pri Esp-literaturo. — S-ro Rektoro Sam Jansson, Stockholm, prelegos pri internaciaj kaj esperantaj temoj. — S-ro Teo Jung, Den Haag, redaktoro de "Heroldo" prelegos dum la internacia 10-taga ferio. — F-ino M. Noll, la eminenta pionirino de la dana Esp-movado, pri Esp-historio. — S-ro P. Neergaard, LK-ano, Kopenhago, pri lingvosciencaj temoj. — S-ro L. Friis, Aabyhøj, instruos pri Esp-gramatikaj problemoj en perfektiga kaj seminaria kursoj.

Loĝo kaj manĝo. Ĉiuj partoprenantoj loĝos kaj manĝos en la Internacia Altlernejo. Jen la granda avantaĝo de tiuj kursoj, ĉar tiel la multaj diversnaciaj gesamideanoj havos favoran okazon por ĉiam esti kune kaj por praktiki kaj ekzerci nian lingvon. La manĝaĵoj estas bonegaj kaj la ĉambroj belaj kaj puraj. Se en la lernejo ne estos sufiĉe da unupersonaj ĉambroj, oni luos tiajn en privataj vilaoj tuj apud la Internacia Altlernejo. La aliaj ĉambroj estas 2- aŭ 3-personaj. Oni manĝos 4—5-foje ĉiutage.

Prezo. La restado (kurskotizo, manĝo kaj loĝo) dum la internacia kurssemajno en julio kostos 48:— d. kr.; por unupersona ĉambro 10:— d. kr. pli.



Elementa kaj daŭriga kursoj de somero 1937.

La restado dum la 10-taga internacia ferio esperantista en aŭgusto kostos 55:— d. kr.; por unupersona ĉambro 10:— d. kr. pli.

1:— d. kr. egalvaloras proksimume 0,88 sv. kr.

Pro la malalta dana monkurso la partopreno en la kurssemajno aŭ en la 10-taga esperantista ferio estas eksterordinare malmultekosta.

Programo: Ambaŭ aranĝoj estas malfermataj en la alventago vespere je la 20-a h. en la festsalono. Dum la internacia kurssemajno la lecionoj okazos ĉiutage de la 9-a—13-a horo. Dum la 10-taga ferio okazos unu prelego antaŭtagmeze kaj plejofte unu vespere.

Posttagmeze okazos ekskursoj al multaj vidindaj lokoj (kastelo "Kronborg"; la eminenta banloko "Horn-

VETNI

att I.E.L.'s nyutkomna årsbok för år 1938 omfattar 350 sidor och att innehållet är utomordentligt värdefullt och intressant?

VETNI

att årsboken erhålles vid aktivt medlemskap i I.E.L. (kr. 4:—.)?

ANMÄLDER

alltså som aktiv medlem genom att insända 4 kr. till ĉefdel. Karl Wästfelt, Lundagat. 44, uppg. 2, Stockholm.

JOLANTA FÖLDES:

La Strato de Fiŝanta Kato

"Ĉi tiu rakonto gajnis literaturan premion, ĝi aperis en pli ol dek lingvoj, — kaj plenmerite. Libro valora kaj tute aktuala. Preterpasas antaŭ niaj okuloj la tuta mizera (aŭ granda, se vi preferas) tempo ekde la bolŝevika revolucio ĝis alveno de la Tria Regno."

(Teo Jung en Heroldo.)

Prezo: Broŝ. kr. 5:—, bind. 6:25.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
Stockholm 1.

baek", Nordselando; insuleto "Hveen" en Öresund; Helsingborg kaj Kullen ktp.) per aŭtobusoj, trajno kaj ŝipo. Tiuj ekskursoj estas tre malmultekostaj.


Vespere estos aranĝataj amuzaĵoj, diskutoj, paroladoj, teatraĵoj kaj kantado komuna.

Estimataj gelegantoj! Utiligu do ĉi tiun eksterordinare favoran okazon por pasigi tre malmultekostan ferion en la plej bela parto de Danlando en internacia rondo de gesamideanoj, ĉu por lerni la sukcesplenan Cseh-metodon, ĉu por perfektigi en nia lingvo, ĉu por aŭskulti interesajn Esp-prelegojn. Neforgesebla estos tia ferio en la Internacia Altlernejo kune kun multaj diversnaciaj samideanoj en sincere amika atmosfero. Oni faros ĉion por agrabligi al la internacia kursanaro kaj feriantoj la restadon, tiel ke la Internacia Altlernejo estu vere Esperantohejmo.

Ĉiuj estos kore bonvenaj!


Aliĝojn bonvolu sendi al

S-ro L. Friis,
sekretario de la kursaranga komitato,
Thyrasvej 15, Aabyhøj,
Danlando.



Perfektiga kaj seminaria kursoj de somero 1937.

Someraj Esperanto-restadoj en Danujo.



La popola altlernejo en Ry (loko por la 10-taga ferirestado).

S-ro Harald Grønberg, kiu en la lastaj jaroj organizis la grandsukcesajn somerajn restadojn kun kursoj en Ry (70 partoprenantoj el 4 landoj) kaj en Fuglsø (160 partoprenantoj el 10 landoj) dum la somero de tiu ĉi jaro aranĝos la 3-an "internacian lagordan restadon". Ĝi okazos en Ry (Danjujo), en bela regiono kun lagoj ĉirkaŭataj de ĉarmaj fagarbaroj kaj montetoj, de la 31-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto. Dum la restado okazos 3 diversgradaj Esperanto-kursoj: a) Komenca kurso, Cseh-metoda; b) Daŭriga kurso, lernolibra metodo; c) Perfektiga kurso, speciale por geinstruistoj. En la kursoj la instruadon plenumos: s-ro Aug. Weide (el Germanujo), s-ino Weide (el Danujo), s-ro Kn. Aa. Andersen, s-ro H. E. Jensen, Toustrup, s-ro H. Grønberg.

Krom la kursoj okazos ankaŭ paroladoj en Esperanto pri internaciaj temoj, farotaj de: s-ro Uffe Hansen, s-ro H. E. Jensen, s-ro Johs. Terkelsen, d-ro I. Simon, Wien, kaj aliaj esperantistoj.

La kursoj kaj kunvenoj, same la loĝado kaj manĝado de la partoprenantoj okazos en la granda popola altlernejo, kie estas loko por 200 personoj. (Vidu la bildon.)

La kostoj de la restado: Kursokotizo 8 danaj kronoj. Plena pensio kostos por la 10-taga restado 32 aŭ 35 aŭ 40 d. kr., laŭ grandeco de ĉambro.

Ilustritan prospekton kun ĉiuj detaloj oni povas ricevi de la organizantoj, s-ro H. Grønberg, Risskov, Danlando, kaj s-ro G. H. M. Kat, Spoorstr. 142, Leeuwarden, Nederlando.

Antaŭ la Ry-restado s-ro H. Grønberg aranĝas internacian 3-tagan ferirestadon en la agrikultura kaj mastrumada lernejo en Risskov, antaŭurbo de Aarhus, Danlando, 28/7—31/7. Plena pensio kostos po tage: 5 dan. kronojn. De la lernejo oni ekskursas al vidindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo kaj poste kune vojaĝos al Ry. Informojn donas s-ro H. Grønberg, Risskov, Danujo.

Danaj esperantistoj vizitos Nederlandon.

Dum la somero de ĉi tiu jaro okazos karavanaj vojaĝoj de danaj geesperantistoj al Nederlando. La unua karavano konsistas el junaj danaj terkulturistoj, kiuj petis s-ron H. Grønberg aranĝi specialan studvojaĝon por terkulturistoj. La aŭtobusa karavano ekiros de la urbo Aarhus la 4-an de julio kaj venos al Friesland la 5-an de julio. Post restado tie la karavano veturos trans la ega digo al Amsterdamo—Utrecht—Arnhem. Ĉie survoje la karavano vizitos agrikulturajn vidindaĵojn.

La dua karavano por danoj, svedoj kaj norvegoj ekiros de Aarhus la 29-an de julio kaj veturos al la Esperantodomo en Arnhem, kie la partoprenantoj pasigos unu tutan semajnon, farante ĉiutagajn ekskursojn tra la bela regiono de Nederlando kaj aŭskultante prelegojn de Andreo Cseh pri lingvaj aferoj kaj pri instruado de Esperanto.

Detalajn informojn oni povas ricevi de la organizanto de la karavanaj vojaĝoj, s-ro H. Grønberg, Risskov, Danujo.

Rondvojaĝoj en Estonio.

En la pasinta somero la estona Esperanta Turista Komisiono komencis aranĝi semajnofinajn aŭtobusajn ekskursojn kaj rondvojaĝojn en Estonio, kiujn partoprenis ankaŭ multaj svedoj kaj aliaj eksterlandanoj. Pro ilia bona sukceso EToKo aranĝos similajn semajnofinajn rondvojaĝojn ankaŭ dum la proksima somero, sed jam pli sisteme kaj grandskale — ili okazos jam ĉiusemajne dum la 3 someraj monatoj. Ilia daŭro estos 1—3 tagoj kaj la prezoj varias inter 3—12 kronoj, depende de la longeco de la vojaĝo. Ni esperas, ke multaj svedoj partoprenos ilin, por konatiĝi ne nur kun nia ĉefurbo, la historia kaj pitoreska Tallinn kun multaj memoraĵoj el la sveda tempo, sed ankaŭ kun la interno de nia lando. Informojn donas Esperanta Turista Komisiono, poŝtkesto 6, Tallinn, Estonio.

H. Seppik.

Internaciaj ekskursoj en la Nordo.

Dum la proksima somero la ĉeĥoslovaka Esp.-Asocio aranĝos kune kun la estona Esp. Turista Komisiono tutan vicon da ekskursoj al Estonio, el kiuj kelkaj vizitos ankaŭ la aliajn nordajn landojn. Por ke en tiuj ekskursoj regu vera internacia spirito, la aranĝantoj ĝojos, se en ili partoprenos ankaŭ svedoj kaj alilandanoj, egale, ĉu esperantistoj aŭ ne. Precipe ni rekomendas jenajn vojaĝojn:

1. *Norda Glacia Maro.* Forveturo el Tallinn la 8 julio, reveno al Stockholm la 22 julio. La vojaĝo okazos ŝipe, fervoje, aŭtobuse, motorboate kaj aŭtomobile. Oni travojaĝos la tutan Finnlandon, finnan Laplandon, veturos 2 tagnoktojn sur la Glacia Maro (kabinoj de I klaso), venos preter Nordkap al la norda Norvegio kaj restos plurajn tagojn en la sveda Laplando. Prezo: 315:— sv. kronoj. Registriĝoj estas akceptataj ĝis la 20 majo.

2. *Rondvojaĝo en Estonio kaj Finnlando.* Forveturo el Stockholm la 18 junio, reveno la 3 julio. En Tallinn oni partoprenos la grandiozan 11-an tutlandan kantfeston, rigardos la gekantistan procesion en naciaj kostumoj, ĉe estos la celebradon de la 20-jara jubileo de la Estona Respubliko. Poste oni vizitos la historian Narva kaj la rusan limon, la minejojn de la brulanta ŝtono ĉe Narva kaj faros tutsemajnan rondvojaĝon tra la plej belaj partoj de Finnlando. Prezo: 142:— sv. kronoj. Aliĝojn oni akceptas ĝis la 1 de junio.

La prezoj enhavas ĉion: vojaĝo, manĝo, loĝo, vidindaĵoj, transporto de pakajoj, trinkmono ktp. Aliĝojn akceptas kaj informojn donas s-ano H. Seppik, Esperanta Turista Komisiono, poŝtkesto 6, TALLINN, Estonio. Por respondo bonvolu aldoni poŝtmarkon. Popularigu ĉi tiujn unuajn internaciajn ekskursojn per-esperantajn en via loka gazetaro kaj varbu al ili partoprenontojn inter viaj gekonatuloj!

Moderna sveda liriko. III.

Arnold Ljungdal

apartenas al grupo de akademiaj radikaluloj. En klaraj, iomete malvarmaj liberaj versoj li kritikis la socion. Lian tipon bone elmontras ĉi tiu

Printempa proklamo.

Ne,
nun aŭdu min kaj finu,
ĉi tio ne devas esti pli longe!
Forpelu la printempon en malliberejon!
Sternu tukegon antaŭ la sunon
por ke niaj pusplenaj okuloj
ne atestu la malbonaĵon!

Estas ja fakte revolucio:
la glacio konstruas barikadojn en la stratanguloj,
la nuboj salutsignas per ruĝaj standardoj en la sunsubiro.
La vento ĉirkaŭvagis,
distribuante flugfoliojn en la krepusko
kaj frustrante kuraĝajn ribelvortojn
en la orelojn de la subpremitoj —
baroj kaj digoj krevas en mil pecojn
kun tondro kiel de dinamito.

(Maldece,
vere maldece,
kion do nia honesta popolo opinios
pri tiu modero, kiu devas regi
dum purigo de la socia domo —
kun tiaj ekzemploj antaŭ la okuloj!)

Kaj tial, sinjoro poliestro,
vian atenton al la printempo!
mi postulas eksterordinarajn disponojn,
mi atendas ĝeneralan sieĝostaton,
postulas,
ke oni plimultigu la polican forton,
duobligu la nombron de gardistoj
kaj lasu enkarcerigi ĉiujn agitistojn
— ventojn, nubojn, sunradiojn, fluetojn —
por ke la aŭtoritato de l' neŝanĝemo restu plenforta
kaj la elprovita potenco de la vintro
regu eterne.

Nils Ferlin

prikantas en sprite bonhumoraj momentoj la stultecon kaj kortuŝan naivecon de la homoj. Sed en pli akre malgajaj momentoj li fariĝas satira kaj malespera. Li sentas sin pajaco kaj lace kaj peze li sopiras al la morto, kiu tiam ŝajnas al li eterna:

Tranoktejo.

Krematoria korpo jam
cindrigas la animon
kaj ne ĝueblas plu la am'
al vino kaj opi':
modeste migru el la flam',
celante ĉiellimon
— por multaj pli ol formalaj'
ne estas l' agoni'.

Forpaŝu sen terur-frenez',
eĉ kvankam ŝancelante,
se sonas kun lacec' kaj pez'
mortvalsa melodi'.
li staras, Mort', en vivomez',
la torĉon estingante.
Ne estas pli ol formalaj'
— kaj poste nur neni'.

Postrestas nur por vi pere'
— verdbele vi dormiĝos
kaj ne memoras plu pri ve'
kaj pri vivaĉa vund'.
Fingret' en ringa sanktole'
malgrasa, blanka iĝos —
sed ion ne rimarkos vi
en tomba terprofund'.

La tempon lasu al la vent';
Dornroze dormu ĝoje.
Dornrozo dormis jarojn cent
— el ĉiuj dormu plej!
Pri tempo zorgu nur la vent'
— penpenis vi survoje
kaj venis vi apenaŭ ĉi
al tiu tranoktej'.

DE ĈIE, PRI ĈIO, AL ĈIU.

Kiel Esperanto povas servi al malgrandaj popoloj?
Cu vi scias, kiu estas Tomas Nipernadi kaj kiu estas August Gailit? Certe ne, kaj vi neniam aŭdis pri ili. Sed kial? Tute simple — ĉar August Gailit estas nek anglo, nek germano, nek franco, nek eĉ svedo, nek ĉeĥo, sed ĉi tiu estas, kaj ĉar li havis la malfelicon verki sian plej bonan romanon en lingvo, kiu parolas nur 1.000.000 da homoj. Se li apartenus al iu granda popolo kaj se li estus verkinta sian libron en iu "mondlingvo", certe li estus jam konata tra la tuta mondo kaj lia romano estus tradukita al ĉiuj kulturlingvoj. Sed nun?
Gailit multe klopodis, por ke lia romano, kiu certe devus aparteni al la mondliteraturo, estu tradukita en aliajn lingvojn, sed ĉi tiu nun rezultite. Ĉar ne ekzistas personoj, kiuj povus fari tiun tradukon! Jes, ankaŭ kelkaj jaroj aperis germana traduko, sed ĉi tiu estis tiom rusta, ke la aŭtoro ne volas ĝin rekoni kiel sian verkon. La germana oni tradukis ĝin polanden, sed kompreneble la rezulto estis ankoraŭ pli mizera. Li sukcesis interesigi italan eldonejon, sed kie pri ĉi tiu homon, kiu povus el la

estona traduki literaturajn al la ĉi tiu lingvo? Svedan tradukon, ĉar iu sinjorino, sed kiam la eldonanto ekvi-

LA FELIĈULOJ !



SUNO, AMO, LM. LIBRO

Mendu ĉe

Eldona Societo Esperanto.

Box 698, Stockholm 1.

Esperanto världen över.

Parismässan använder esperanto.

Ledningen för "Foire de Paris" har i år, liksom tidigare under en följd av år, utgivit ett illustrerat prospekt samt en stor affisch över mässan på esperanto. Mässan äger rum mellan 21 maj och 6 juni. Prospekt och affischer kunna erhållas från "Foire de Paris", 23 Rue N.D. des Victoires, Paris.

Esperanto i bulgariska skolor.

Esperantospråket har upptagits såsom frivilligt läroämne i de bulgariska handels- och yrkesskolorna, enligt dekret från den bulgariska ministern för handel och industri.

Esperanto obligatoriskt läroämne i flygskola.

Vid flygskolan i Paris (Ecole Speciale d'Aéronautique, 151 boulevard de l'Hopital), förekommer obligatorisk undervisning i esperanto.

Dansk turistbroschyr på esperanto.

Danska Turistföreningen, Vestre Boulevard 18, Köpenhamn, har utgivit en vackert illustrerad broschyr på esperanto.

Engelsk firma använder esperanto.

Firman E. Gray & Son Limited, London, som tillverkar motorer och metallvaror, använder esperanto i sin korrespondens med utlandet. Firmans adress är 18—20 Clerkenwell Road, London E.C.1.

Engelsk stad utger broschyr på esperanto.

Badorten Weston-super-Mare har nyligen utgivit ett illustrerat prospekt på esperanto över staden. Prospektet kan erhållas från: S-ro V. Turner, Publicity Manager, Knightstone Pavilion, Weston-super-Mare, Somerset, England.

10 de Sokolkongressen i Praha 1938.

Ur ett prospekt på esperanto om denna kongress översätta vi följande: "Jubileumsåret 1938 kommer att ge världen tillfälle att i samband med den 10:e Sokolkongressen också lära känna den höga moraliska och samhälleliga andan hos den tjeckoslovakiska nationen. Namnet "Sokol" (falk) är sedan länge känt utanför Tjeckoslovariens gränser. Det är namnet på den tjeckoslovakiska gymnastikrörelsen grundad 1862 av Dr. Miroslav Tyrš och Jindrich Fügner. Inspirerade av det italienska folkets frihetskamp, grundade dessa män Sokolrörelsen såsom ett medel till kulturell och politisk renässans av den tjeckoslovakiska nationen. Gymnastikens utövande betraktades av dem — enligt den antika devisen "Mens sana in corpore sano" — som modets och den moraliska renhetens fundament, vilket i sig innebär disciplin, solidaritet och styrka för hela nationen — och en frisk nation kan man inte neka en anständig plats i nationernas familj. Nationens pånyttfödelse genom fysisk fostran, se där det väsentliga i och målet för Sokolidén.

Den av Tyrš och Fügner grundade föreningen blev snart en nationell rörelse, vilken för varje tjeckoslovak

blivit en hjärtesak. Sokolmedlemmarna utgjorde en folkarmé under den tid, då den tjeckoslovakiska nationen ej hade egen armé, och om det betydelsefulla året 1918 fann det tjeckoslovakiska folket politiskt moget och värt politisk självständighet, så är detta i första hand Sokolrörelsens förtjänst.

Nu har den tjeckoslovakiska Sokol omkring 800.000 medlemmar: män, kvinnor, ungdom, skolungdom, organiserade i 3265 lokalföreningar. Den har mer än 1000 välutrustade gymnastikhallar och över 2000 idrottsplatser. I Sokol är således omkring 65 % av den tjeckoslovakiska nationen direkt organiserad. Majoriteten av folket sympatiserar med Sokolidén: hälsa, skönhet, manlighet och rättvisa. Sokolfostran börjar redan vid sexårsåldern, den är allsidig, fysisk och intellektuell, den omfattar män och kvinnor. Sokols fysiska fostran har hygieniskt, moraliskt, ekonomiskt, socialt, fostrande och nationsförsvarande mål, den avvisar sportslig ensidighet och militär mekaniskhet. Dess mål är fysiskt och moraliskt fullkomliga medborgare — solida bärare av den nationella, kulturella och ekonomiska självständigheten. Den är byggd på frivillighetens grund. Genom sin devis: "Varken profit eller ära" bidrager Sokolidén kraftigt till bevarandet av den nationella disciplinens och medborgerliga ärlighetens höga nivå." — Den 10:e Sokolkongressen äger rum under juni och juli i år.

Brasilianska postverket använder esperanto.

Postkontoret på Avenuo Rio Branco i Rio de Janiero använder en brevstämpel, vars text bredvid namnet på staden innehåller följande reklamtext på esperanto: "turisma urbo".

Stor brasiliansk organisation propagerar för esperanto.

Den brasilianska kulturorganisationen Federação Espirita Brasileira, som är en mäktig organisation med ett stort förlag och lokalföreningar i hela landet, har beslutat börja en energisk propaganda för esperanto. I sitt organ "Reformador" publicerar den regelbundet upplysningar om esperanto. Förlaget utger böcker om och på esperanto.

Esperantokunniga finnas överallt.

På den nederländska prinsessan Beatrix födelsedag släppte flera skolflickor i den holländska staden Roermond upp små ballonger, vid vilka kort med flickornas namn voro fästade. Tre veckor därefter kom ett paket jämte ett brev på esperanto från Finland till flickorna. I paketet voro några hopbundna ballonger och i brevet upplysning om att Reino Järnfors, son till en skogsarbetare i byn Kärsämäki invid staden Uleåborg (Oulu) i norra Finland, funnit ballongerna den 7 febr. Upphittaren bar ballongerna med de vidhäftade korten till redaktionen för tidningen "Kaleva", som publicerade en stor artikel den 13 februari om de upphittade ballongerna samt återsände dem sedan till flickorna tillsammans med många vackra bilder från Finland. — Det är intressant vilken lång väg ballongerna tillryggalagt, men lika intressant är att på nytt kunna peka på det faktum att esperanto fungerar såsom internationellt förmedlingsmedel.

Bok på esperanto om flamländskt krigsmonument.

En liten illustrerad bok på esperanto om det berömda krigsmonumentet på Izerslätten bredvid Diksmuide till minne av flamländska krigshjältar har utgivits. Den kan erhållas gratis från: S-ro Cl. De Landtsheer, Maria Doolaechestraat 39, Diksmuide, Belgien.

VERDA REVUO

ne plu aperas. Ĉiuj ĝiaj abonantoj ricevos dum la monatoj majo kaj junio sian abonpagon 1938. Se Verda Revuo ne povos sendi monon, ĝi sendos librojn en la sama valoro de la abonpago.

VERDA REVUO

tutkore dankas al ĉiuj gesamideanoj en tutmondo. Nuna adreso: S-ro Franz Scheibenreiter, Wien VII, Hermannng. 31/26, Österreich-Deutschland.

Internaciaj Esperanto-restadoj en Danlando:

Risskov Agrikultura Lernejo, 28/7—31/7; 15 d. kr.
Ry Popola Altlernejo, 31/7—10/8; 32—48 d. kr.
(Lastjare 160 partoprenantoj el 10 landoj.)

Karavanoj ankaŭ por svedoj:

Studvojaĝo por terkulturistoj al Nederlando, 4/7—12/7; 60 d. kr.

Skandinavia Esp.-vojaĝo al Arnheмо, Nederlando, 29/7—12/8; 45 d. kr.

Senkostaj prospektoj haveblaj ĉe

H. Grönborg, R i s s k o v, Danlando.

Nya prenumerationspriser å LITERATURA MONDO

Tidningen utkommer numera enligt följande plan: 6 sextonsidiga nummer av Literatura Mondo, 6 sextonsidiga nummer under namn av Revuo de l' Mondo och 4 nummer av Lingvo Libro. Priset pr helår höjes samtidigt från kr. 7:— till kr. 7:40 pr år. Prenumeration mottages av:

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Stockholm 1.

Till nytta och nöje vid resor:

Vermland, rikt illustrerad turistbroschyr om Gösta Berlings land.

Lappland: midnattssolens, lapparnas och fjällvidernas land.

Uppsala, vårens, ungdomens och glädjens stad.

Stockholm, Mälardrottningen, ett industriens, handelns och vetenskapens centrum.

Pris för de tre första broschyrerna 25 öre, för Stockholmsbroschyren 50 öre.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Stockholm 1.

La problemo de lingvo internacia

Professor Björn Collinders uppmärksammade radioföreläsningar, utgivna av Paul Nylén.

Pris kr. 1:30.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Stockholm 1.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

håller ordinarie årsmöte *måndagen den 6 juni 1938 kl. 10 f.m. å Rådhuset i Arboga.*

Ärenden enligt stadg. § 11.

Styrelsen.

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1938.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksg. 30, Sthlm. Tel. 10 53 27, bost. 30 75 15.

Prenumerationspris: Helt år kr. 3:—. Lösnummer 0:25.

Utkommer en gång i månaden.

Annonspolis: 20 öre pr mm.

Korrespondensannonspolis: 2 svarsakuponger.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm.

Tel. 31 65 01.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm. Tel. 20 00 43. Postgiro 2012 (medlemsavg. o. dyl.). S.E.F:s Propagandafond. Postgiro 150548. (Gåvor till fonden.)

Avgiften i S.E.F.: Enskilda medlemmar erlägga 5:— kr. pr år och erhålla tidningen gratis.

Klubbar erlägga för varje medlem 35 öre pr kvartal. Varje ansluten klubb erhåller 1 tidning gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. Postgiro 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET. Examensavd.: Bergsvägen 41, Lidingö. Examensavg. erlägges till postgiro 51511, adress: Tegelbacken, Stockholm.

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO: Tegelbacken, Stockholm. Tel. 20 00 43. Postgiro 50360.

STOCKHOLMS ESPERANTOFÖRENING (Grupo Esperantista de Stockholm), Wallingatan 3, 4 tr. Onsdagar kl. 20.

INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL — (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Lundagatan 44, uppg. 2, IV, Stockholm. Poŝtĉeka konto 15 12 88. (Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 4:—; Membro-Abonanto 10:—; Membro-Abonanto-Heroldo 19:—; Membro-Subtenanto 25:—; Membro-Dumviva 200:—; Patrono 100:—.

OFICISTO,

vira aŭ virina, kun bona scio pri Esperanto kaj librotenado, maŝinskribado kaj prefere ankaŭ stenografio, laborema, energia kaj ordema, kun intereso por la Esperantomovado, estas serĉata. Respondojn kun atestkopioj kaj rekomendoj sendu al FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO, Fako 698, Stockholm 1.

CYKELVIMPLAR

med esperantostjärna.

Vimplarna äro tillverkade av kraftigt, hållbart tyg med varaktigt färg.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO,
Stockholm 1.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

